*Januaro 2025 • n-ro 01/2025*

# KONGA STELO

## Nyota ya Kongo

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) kunlabore kunaliaj kongolandaj organizoj.*



J. Drahotova

**Enhavo**


Redakcie 2

De koroj al koroj 3

Saĝa maljunulino 4

Malkovru, lernu kaj uzu

Esperanton kun uTalk 5

Instruistoj de la jaro 7

Raporto pri donaco 8

La revoj kaj defioj 10

Zamenhof-tage 12

Raporto pri DKEA 14

Retrorigarde al la konga e-

Movado 15

Senkuraĝiĝo 16

Stulta farmisto 17

Leciono pri la svahila

Lingvo 18

## Redakcie

***Joel Muhire***

Feliĉan novjaron 2025!



Senhalte impetas la tagoj!

En tiuj ĉi transiraj tagoj novjaren disflugas bondeziraj retmesaĝoj inter esperantistoj, kia ĝojo atingi la finon de la jaro! Bondezirojn!

Nia revuo naskiĝis en la pasintjara julio, nun faras transpaŝon en la duan jaron de ĝia ekzisto, kaj esperеble ĝi pluvivos danke al vi, niaj legantoj kaj kontribuantoj. Ni esprimas ĝojon, ke Konga Stelo ekinteresas multajn, ne nur kongolandanojn. Ĝi ekbrilas kaj disradias al la tuta mondo, jen nia ĝojo!
En la du antaŭaj numeroj ni informis vin pri la celo de Konga Stelo, t.e helpi al kongolandanoj informiĝi pli regule pri la enlanda E-movado kaj fervorigi junulojn daŭre movadumi, tamen bonvenaj estas artikoloj el eksterlando pri la movado, ili ja povas esti inspiraj por pli forta e-movadumo en DR Kongo. Ĉi-numere do, **Rob Ebenau** el Belgujo informas nin pri interesa lingvoinstrua programo uTalk, el Ĉinio, samideanino **Yangkaijing Brilo** parolas al ni pri sia "unikan ĉarmon de la Esperanto-rondo". **Bimenyimana Serugendo Michael** el Goma parolas pri la bonfaraj agoj de esperantistoj, **Malekera Bonne Idée** el Uvira ekzemplas pri tiu bonfara agemo. Vi legos ankaŭ pri la Zamenhofa tago en Kinŝaso kaj la raporto pri la kunsido de DKEA, la Landa Asocio kaj historia superrigardo pri la kongolanda e-movado. Samideano **Prime Nsabimana** admonas nin en sia artikolo Senkuraĝiĝo. Ne mankas en tiu ĉi numero kiel kutime amuzaĵoj, sed ankaŭ leciono pri la svahila lingvo.

Karaj legantoj, ni lasas al vi malkovri mem la enhavon de tiu ĉi numero, viaj rimarkigoj kaj konsiloj multe valoras por posta plibonigo en la venontaj numeroj. Frontpaĝe, ni anstataŭis la francan nomon "Etoile du Congo" per "Nyota ya Kongo", en la svahila, unu el la kongolanda lingvo. La bildo estas sendaĵo de J. Drahotova, Ĉehio.

**Kiel sendi kontribuaĵojn al *Konga Stelo?***

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en formato RTF.

Viajn artikolojn sendu al *joelmuhire0@gmail.com* plej laste je la fino de ĉiu tria monato.

Jam vi povas ekpensi pri via kontribuo por la aprila numero. Temoj estas : e-agado en via regiono, poemoj, naturo, kulturo, rakontoj, humuraĵoj, ktp.

**Koran antaŭdankon pro via kontribuo!**

**DKEA:** Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio.
**ILEI:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
www.ilei.info

# De koroj al koroj: La bonfaraj agoj de esperantistoj

**Bimenyimana Serugendo Michael - Goma**



La internacia lingvo Esperanto ne nur servas por pli facila komunikado inter diversaj kulturoj, sed ankaŭ inspiras profundan solidarecon kaj humanan empation. Tra la jaroj, esperantistoj ĉirkaŭ la mondo iniciatis diversajn bonfarajn agojn, kiuj montras, ke la lingvo ne estas nur ilo por interkomunikado, sed ankaŭ ponto inter koroj.

### *Solidareco Sen Limoj*

Unu el la plej rimarkindaj trajtoj de la Esperanta Komunumo estas ĝia sento de internacia solidareco. Multaj esperantistoj engaĝiĝas en humanitaraj projektoj, ofte trans limoj, kie tradiciaj lingvaj baroj povus malhelpi kunlaboron, ekzemple, organizoj Monda-Helpo aŭ Internaciaj Junularaj Projektoj kolektas rimedojn por helpi lokajn komunumojn en krizoj, ĉu temas pri naturaj katastrofoj, edukaj iniciatoj, aŭ sanservo. En Afriko, esperantistoj subtenas edukajn projektojn en regionoj kun malmulte da aliro al lernejaj rimedoj, en konstruado de lernejoj kaj liverado de lerniloj al vilaĝoj, kie la edukaj bezonoj estas plej grandaj.

### *Kultivado de Homaj Rilatoj*

Esperantistoj ofte asertas, ke ilia lingvo havas humanan dimension. Tio estas klare videbla en la gastigemo, kiun ili montras unu al la alia. La Pasporta Servo, ekzemple, ne nur funkcias kiel gastig-reto por vojaĝantoj, sed ankaŭ kiel platformo por krei amikecon. Multaj homoj, kiuj utiligas tiun servon, atestas, ke ĝi donis al ili ne nur lokon por tranokti, sed ankaŭ vivdaŭrajn amikojn.
Kiam krizoj okazas, tiuj rilatoj fariĝas valoraj rimedoj por interhelpo.

### *Esperanto en krizoj*

La engaĝiĝo de esperantistoj en krizaj situacioj estas tre rimarkinda. Kiam tertremoj, inundoj aŭ aliaj katastrofoj trafas iun regionon, ofte oni povas vidi la agadon de Esperanto-grupoj, kiuj subtenas viktimojn per volontulado. En Ukrainio, ekzemple, esperantistoj ludas gravan rolon per organizo de humanitara helpo al la trafitaj loĝantoj.

### *Eduka kaj Kultura Agado*

Esperantistoj ankaŭ kontribuas al socia progreso pere de edukaj kaj kulturaj iniciatoj. Ili ofte uzas la lingvon por krei senkostajn edukprogramojn, precipe en malriĉaj regionoj. Multaj projektoj celas instrui junulojn ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ aliajn kapablojn, kiuj povas plibonigi iliajn vivokvalitojn, kiel ekzemple teknologio, agrikulturo kaj daŭripova evoluo.

### *Inspirita de Universala Amikeco*

La filozofio de Esperanto - *"unu mondo, unu lingvo, unu popolo"* - instigas homojn agi ne nur por sia propra profito, sed por la bono de

ĉiuj. Tiu ideo de universala amikeco inspiras ĉu en sia propra lando, ĉu en la alia flanko de la mondo.

**Konkludo**

De koroj al koroj, la bonfaraj agoj de esperantistoj pruvas, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed vera movado por homa solidareco. Ĉi tiuj agoj montras, kiel komuna lingvo povas krei platformon por internacia kunlaboro kaj inspiri homojn helpi unu la alian. Ĉu temas pri edukado, krizhelpo aŭ simpla gastigemo, esperantistoj montras, ke ilia lingvo estas potenca ilo por krei pli bonan mondon.

## Saĝa maljunulino



Maljuna sinjorino, kiu promenis sur la strato, estis puŝfaligita de junulo!
Anstataŭ peti pardonon kaj helpi la sinjorinon leviĝi, li komencis ridi kaj malrapide daŭrigis sian vojon...
Surprizita, la kompatinda virino diris per laŭta voĉo:
– Junulo, vi faligis ion !
Li tuj turnis sin kaj komencis ĉirkaŭrigardi ĉirkaŭ la maljunulino...
Rigardante en liajn okulojn, ŝi informis lin:
– Mia knabo, ne ĝenu vin ĉirkaŭrigardi.
Kion vi ĵus perdis, vi neniam plu trovos...
Vi perdis vian homecon.
**Konsilo :** *La vivo estas senvalora se ĝi estas sen respekto, empatio kaj memestimo !*

**Deziras korespondi :**

- ***Justin NDAGIJIMANA***, 23-jaraĝa progresanto kaj membro de Rondo Esperantista de Kiwanja (REK), Rutshuru – DR Kongo. Mi deziras korespondi kun vi por plibonigi mian Esperanto




Rete : jndagijimana19@gmail.com

- ***Elie HAVUGIMANA***, 37-jara esperantisto el Goma – DR Kongo, iama membro de Rondo Esperantista de Kiwanja. Li eklernis Esperanton en 2008.




Rete : elie.esperanto@gmail.com

# Malkovru, lernu kaj uzu Esperanton kun uTalk!

**Rob Ebenau - Belgujo**

***Rob Ebenau*** *estas direktoro de CDline en Belgujo, distribuisto de eduka programaro kaj iniciatinto de la Esperanto-versio de uTalk)*

Ĉu vi sciis, ke ekzistas lokalizita lingvo-lernada programo, kiu ebligas al vi lerni Esperanton elire de iu ajn lingvo, kiun vi jam parolas?





**Figuro1: Iuj lingvoj el la uTalk-Gamo**

La uTalk-apo helpas homojn lerni kiel rekoni kaj elparoli pli ol 2 500 utilajn vortojn kaj frazojn de Esperanto.
uTalk estas Londona eldonejo de lingvo-kursoj, kiu helpas homojn lerni lingvojn dum pli ol 30 jaroj. La eldonejo nun havas kursojn en pli ol 150 lingvoj, inkluzive de Esperanto. La fakto, ke EuroTalk simpatias kun Esperanto evidentiĝas ankaŭ en tio, ke ĝi estas unu el la ĉefaj sponsoroj de Amikumu ekde ties fondiĝo.

## uTalk

La uTalk-apo estis lanĉita en 2015, havebla en la vendejoj de Guglo kaj Apple, kaj la antaŭa kurso vastiĝis al 65 temoj. La temoj koncernas ĉiutagaĵojn, kiel ekz. manĝado kaj trinkado, butikumado, kuirado, irado al restoracio, vojaĝado, sano kaj sporto. La Esperanto-kurso havas temon eĉ pri Esperanto mem, kiu malkaŝas pinton de nia kulturo. La kursmaterialo estas tre utila por komencantoj, eĉ se gramatiko ne estas eksplicite klarigita, ekzistas kelkaj temoj pri gramatikaĵoj: pri prepozicioj, adverboj ks.

## Kiel funkcias uTalk?




**Figuro 2: Iuj temoj**

La kreintoj de uTalk elektis ĉirkaŭ 2,500 el la plej utilaj vortoj kaj frazoj, kiuj tiam estis tradukitaj en ĉiun novan lingvon aldonitan al la programo. Do la tuta vortprovizo en la apo disponeblas en ĉiuj lingvoj de la apo. La granda avantaĝo de tio

estas, ke vi povas lerni Esperanton el ĉiuj aliaj lingvoj kaj inverse. Se vi, ekzemple, volas lerni la svahilan, vi povas fari tion ankaŭ per Esperanto. Aliaj Afrikaj lingvoj per kiu vi povas lerni Esperanton estas inter alia la *Lingala, Burunda, Ruanda, Bemba, Oroma, Joruba, Ganda, Hausa* kaj *Volofa*.

uTalk instruas vin kiel prononci kaj rekoni utilajn vortojn kaj frazojn por ke vi povu tuj ekparoli. Ĝi estas perfekta por komencantoj-kaj valorega por komencintoj serĉantaj plenigi mankojn en siaj vortprovizo kaj prononco.




**Figuro 3: La ekzercaro**

Ĉiu temo funkcias laŭ fiksa ŝablono: ekzercado de vortoj aŭ frazoj, facila ludo, parolludo, malfacila ludo kaj memorludoj. Vi lernas la lingvon ludante.

Ĉiu vorto, kiun vi aŭdas, estas esprimita de denaskaj parolantoj, almenaŭ en preskaŭ ĉiuj lingvoj. En Esperanto tio iom malfacilas. Tamen, ni estas feliĉaj, ke por la virina voĉo kontribuis Katalin Kováts, la estrino de www.edukado.net, kaj por la vira voĉo Sylvain Lelarge.

Ĉiu vorto aŭ frazo estas ligita al bildo, ĉar tio helpas plifortigi la memorprocedon. Dum la ekzercado oni ricevas poentojn por ĝustaj respondoj, kiuj instigas al daŭrigo de la lernado. La aplikaĵo rimarkas, kiujn vortojn vi eraras kaj poste testas vin pri ili pli ofte. Pere de la kolektitaj poentoj eblas akiri novajn temo-pakaĵojn.

Sed la plej grava afero estas, ke ĝi donas al vi la fidon komenci paroli kaj kompreni ŝlosilvortojn tuj de la komenco.

### Senpage aŭ ne?

Senpagaj kursoj de Esperanto oftas en Esperantujo, danke al organizoj kaj volontuloj.

La unua temo en uTalk, *Komencaj vortoj*, estas senpaga kaj vi povas malŝlosi iujn kromajn temojn senpage ludante en-apajn ludojn. Sed fari altkvalitan apon kostas monon do, samkiel lernejoj devas pagi instruistojn, uTalk devas pagi lingvospertulojn kaj programistojn. uTalk estas sendependa eldonejo, kiu nek estas ŝtatsubvenciita, nek havas sponsorojn, nek laboras kun volontuloj. En la apo vi nenie vidos reklamon aŭ limojn.

Por scii pli pri la prezoj, vidu www.lingvejo.com/eo

### Resume

uTalk estas provita lernmetodo, kiu funkcias sur ĉiuj platformoj. Ĝi estas facile uzebla kaj faras la lernadon amuza. Enestas pli ol 150 lingvoj, kio donas pli ol 20 000 lingvajn

kombinaĵojn. Ĝi instigas sendependan lernadon.

uTalk uzeblas por privatuloj, lernejoj, organizoj kaj entreprenoj. Kromaj lecionoj pri la gramatiko de Esperanto helpos kursistojn ankoraŭ pli bone kompreni la kursmaterialon.

Bonega prezo/kvalitorilatumo.

Por ĉiuj kromaj informoj kontaktu la aŭtoron de la artikolo: rob@cdline.be.

# Instruistoj de la Jaro

***Iniciato okaze de la 75-jariĝa jubileo de ILEI en la Zamenhof-Tago 2024.***

ILEI kun subteno de TEJO invitas ĉiujn esperantistojn proponi kandidatojn por du kategorioj:
1. "Juna Instruisto de la Jaro" (35 jarojn aĝa aŭ malpli, t.e. TEJO-aĝo)
2. "Instruisto de la Jaro" (pli ol 35 jarojn aĝa)

**Kandidatoj plejeble havu:**
- Regulecon en Esperanto-instruado
- Aktivajn instrumetodojn
- Novigajn alirojn al instruado
- Historian kaj kulturan konigadon de Esperanto
- Internacian kunlaboradon
- Kreemon de instrumaterialoj
- Longdaŭrajn pozitivajn rezultojn

Al la gajnintoj estos donacitaj:
- Atestilo
- Senpaga aliĝo al TEJO-kongreso (IJK) kaj ILEI-Kongreso de la koncerna jaro
- Senpaga membriĝo en TEJO kaj ILEI kun retaj versioj de revuoj Kontakto kaj IPR en la koncerna jaro
- Unu libro flanke de TEJO por la “Juna esperantisto de la jaro”
- Unu libro flanke de ILEI por la “Esperantisto de la jaro”

Por kandidatiĝo aŭ kandidatigo bv. sendi jenajn informojn pri la kandidato al ilei.prezidanto@gmail.com:
- Personan prezenton
- Konkretajn atingojn
- Kontaktinformojn
- Rekomendojn (se eble)

**Gravaj datoj:**
Limdato por kandidatiĝo/kandidatigo: fino de marto 2025. Sciigo al la gajnintoj pri ilia elektiĝo: fino de aprilo 2025.
Publika anonco pri la gajnintoj: ILEI-kongreso en 2025

Ni atendas viajn kandidatiĝojn/ aŭ kandidatigojn!

ILEI-estraro Zamenhofan Tagon 2024.

www.ilei.info, ilei www.tejo.org tejo

# RAPORTO PRI LA TRANSDONA DONANCA EVENTO AL GEORFOJ

**Malekera Bonne Idee – Uvira, DR Kongo**

Ni unue dankas ĉiujn amikojn pro iliaj kontribuoj, kuraĝigoj, … por la sukceso de tiu evento. Ni dankas la Asocion de Verduloj Esperantistaj (AVE) pro ĝia subteno, ni sekve dankas precipe kara DIDIER IZACARD por siaj altruista kaj filantropa paŝoj al georfoj kaj dankas la lernejestron Xavier Namara Mbirizi de la instituto Notre Dame aux larmes, ĝi estas katolika lernejo kaj kie faris mezlernejajn studojn la prezidanto de KEKU, sinjoro Malekera.




Jen la programeroj :

- Renkontiĝo de georfoj kun la klubo KEKU
- Prezentado de la klubo : kreado, celoj, funkciado, partneroj, pasintaj, nunaj-kaj venontaj projektoj,
- Triminuta prelego de la klubestropri infanaj rajtoj kaj pri edukado
- Transdono de donaco al georfoj
- Fermo
- Komuna foto

1. Renkontiĝo de georfoj kun la klubo ĉe lernejo Notre Dame aux Larmes D'uvira

La evento okazis sine de unu el plej famajsur lokaj katolikaj lernejoj oriente de DR-Kongo, en la urbo Uvira, la 16an de Novembro 2024 de la 15-17a horo. Malfermiĝis la evento per la preĝo kaj post sekvis aliaj programoj. Tiun tagon pluvegis, tamen spite pluvegadon, venis ĉiuj georfoj kaj aliaj invititoj kaj ĉiuj klubanoj kompreneble.

La infanoj estis kontentaj revidi nin unu jaron poste, nia klubo kutimas kunnovjarumi (festi la novjaron) kune kun georfoj, kiel simbolo de unuiĝo, komprenemo kaj valorigo de edukado kaj rajtoj de georfoj. Georfoj entute partoprenis dekope. Tiuj infanoj estas viktimoj de la inundo kaŭzita de la superfluo de la lago Tanganjika kaj de la rivero Mulongwe. La klubo ricevis aŭ kolektis 5% de la projekto do 100$ kaj ĉion transdonis al georfoj por iliaj studoj.

2. Prezentado de la klubo (kreado, celoj, funkciado, partenero, pasintaj, nunaj kajvenontaj projektoj)

La klubo nomiĝas KAKOMBE ESPERANTO KLUBO (KEKU) mallonge, ĝi estis kreita la 5a de Aŭgusto 2022 en laurbo Uvira en la kvartalo Kakombe. Ĝi portas la nomon de la kvartalo mem. Kreis ĝin la juna esperantisto Bonne Idee Enock Malekera. "Mi komencis la klubon nur kun 5 gelernantoj, nun 3 el ili regas bone la lingvon el inter kiuj unu translokiĝis al Kolwezi.

La klubo funkcias tiumaniere, ĉiu membro kontribuas ĉiumonate 1$. Tiu kontribuo

helpas en mutlaj bezonoj, kiel dum malsaniĝoj, ktp.

La klubo estas en partnereco kun la asocio de junaj gvidistoj por la integrala evoluigo (Association de jeunes leaders pour le développement intégral) ankaŭ kun FGG (Fondation Goodluck the Great).




Inter la projektoj, kiujn ĝi jam realigis estasbredado. La nuna projekto estas MAJI (akvoputo), ties sumo por la sukceso estas 2990$ el, kiu nur koletis ni 100$, subvencie de kara Didier nome de AVE.

### 3. Triminuta prelego

Temis pri la rajtoj kaj devoj de georfoj. Georfoj rajtas plialtankvalitan edukadon, studi, ĉar el ili eble fariĝos ministroj, deputitoj, doktoroj, ĉefurbestroj, prezidentoj, ktp. Ankaŭ ili havas devon al io, kiel ekzemple respekti ĉiun, esti honestaj kaj lasi Dion batali por ili ol ili batali por si mem.

### 4. Transdono de donaco al georfoj

Kiel estas jam menciite supre, ke la klubokunlaboras kun AJLD, la klubo devis transdoni la subvencion al la prezidanto de tiu asocio, prezidanto Janvier Seba wa Seba, kiu prizorgas la georfojn.

### 5. Fermo

La evento fermiĝis ankaŭ per la preĝo kaj memorigo, ke ĉiun decembron kaj januaron okazados festoj kun georfoj, tiel ĉiu membro devas kontribui.




Kakombe Esperanto Klubo de Uvira

Retadreso : malekeracimanu-kabonneidee@gmail.com

## La 81a IJK prokrastita je unu semajno

La 81a Internacia Junulara Kongreso en Cisarua (Indonezio) okazos en novaj datoj: de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2025. La ŝanĝo okazis pro la antaŭe anoncita unusemajna prokrasto de la 110a Universala Kongreso en Brno (Ĉeĥio); legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/12/ijk-26



# La Revoj kaj Defioj de Esperantistoj de Zaozhuang-a Universitato

**Yangkaijing Brilo - Ĉinio**




Zaozhuang, vigla urbo en la sudo de Shandong-provinco, Ĉinio, ne nur havas longan historion kaj riĉan kulturon, sed ĝi ankaŭ havas grupon da homoj, kiuj pasiiĝas pri Esperanto. Mi estas unu el ĉi tiu grupo, kiu nuntempe studas Esperanton en Zaozhuang-a Universitato. Eble sonas strange, ke ĝis nun mi ne partoprenis en multaj Esperanto-agadoj, kvankam mi apartenas al la Esperanto-fako. Tamen ĉiuj malmultaj spertoj estis tre valoraj por mi, precipe la vojaĝo al Pekino en 2023, kiu ankoraŭ estas freŝa en mia memoro.

Tiun jaron, fakte, mi bonŝancis ĉeesti la 14-an Ĉinan Kongreson de Esperanto. Ĝi estis grandioza evento, kiu kunigis pli ol 400 reprezentantojn el 16 provincoj kaj urboj tra la tuta lando. Por povi ĉeesti persone, miaj samklasanoj kaj mi elektis la plej ekonomian manieron - preni malrapidan trajnon al Pekino. Kvankam la 9-hora vojaĝo estis laciga, ĝi ne malfortigis nian entuziasmon. Male, hazarda renkonto dum la vojaĝo igis ĝin eĉ pli neforgesebla. Fakte, entuziasma esperantisto kun multaj scioj rakontis al ni pri siaj personaj spertoj, el kiuj ni multe lernis.

Post nia alveno al Pekino, la sceno de la kongreso estis eĉ pli mirakla. Esperantistoj el

diversaj fonoj kaj aĝoj kunvenis por diskuti kaj kunhavigi la ĉarmon de Esperanto. Tamen, multe surprizis min, ke en tia diversa grupo junaj vizaĝoj estis aparte maloftaj. Ni junaj Esperanto-lernantoj el Zaozhuang-a Universitato preskaŭ fariĝis la fokuso de la renkontiĝo, kvazaŭ "steluloj". Ĉi tiu sperto estis nova kaj defia. Ĝi ne nur testis niajn lingvajn konojn, sed ankaŭ ekzercis nian kapablon esprimi nin antaŭ la publiko.

Dum tiuj kelkaj tagoj, kvankam la streĉa horaro estis plenega de intensa lernado kaj komunikado, mi profunde sentis la unikan ĉarmon de la Esperanto-rondo. Kiel diris mia instruisto, se vi ne persone partoprenas en Esperanto-agadoj, estos malfacile vere integriĝi en tiun grandan familion. Per ĉi tiu kongreso mi konatiĝis kun multaj samideanoj kaj ilia amo kaj persisto al Esperanto inspiris min antaŭeniri. Mi povus diri, ke temis pri ŝlosilo, kiu malfermis por mi pordon al la Esperanta mondo. Sama efiko havas la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a Universitato, kiu bele montras la atingojn de niaj antaŭuloj kaj plene sentigas nin parto de seninterrompa tradicio.

Sed ni devas pli multe fari por propagandi la lingvon inter niaj samaĝuloj. Mi nun estas en la tria jaro de mia universitata kariero, kiu estas ankaŭ la tria de mia renkonto kun Esperanto. Retrorigardante, antaŭ ol mi elektis ĝin kiel mian fakon, mi eĉ neniam aŭdis pri ĝi. En Ĉinio, Esperanto ŝajnas ne tiel konata, precipe inter la plej junaj grupoj. Kvankam estas kelkaj kursoj en universitatoj kaj interrete, ankoraŭ ne estas multaj junuloj pretaj lerni la lingvon profunde. Kontraste, Esperanto prezentas tute alian bildon sur la internacia scenejo. Precipe afrikaj esperantistoj estas plenaj de entuziasmo kaj vigleco. Kaj ilia juna aĝo igas homojn plenaj de atendoj pri iliaj nepraj kontribuoj al la estonta evoluo de Esperanto.

Mi kredas ke ni povas multe lerni de la entuziasmo de la afrikaj junuloj. Kiam pli da ĉinaj junuloj kiel mi ekkonscios pri la unika ĉarmo de Esperanto kiel facila lingvo por tutmonda interkompreno kaj paca komunikado, certe ankaŭ en Ĉinio Esperanto iom post iom revastiĝos. Kiel Esperanto-lernanto, mi sentas honoron esti parto de ĉi tiu procezo kaj esperas povi kontribui al ĝi. Per niaj senĉesaj klopodoj, eble iam Esperanto rebrilos en la tuta mondo.




**El la letero de Brilo :**

Mi nomiĝas Yangkaijing KAJ Brilo kaj mi estas studentino de la Esperanto-fako ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio. Ĉi-semestron ni legis vian belan revuon dum kurso pri Esperanta Ĵurnalismo kaj mi multe ŝatas ĝin!

# ZAMENHOF-TAGE

**Jackson Mafuila kaj Augustin Sanduck – Kinŝaso**

## Cadeps Klubo

La 15-an de decembro, la tuta esperantista mondo festas la tagon dediĉitan al Zamenhof. Cadeps Klubo ne restis indiferenta ĉi-okaze, do ĝi organizis ĉi tiun ceremonion en limigita medio ĉar pluraj el ĝiaj membroj estis malsanaj kaj aliaj estis malhelpitaj pro la teruraj trafikŝtopiĝoj en la urbo Kinŝaso.
La kadro elektita por tiu ĉi memorfesto estis "Espace Elite" en la komunumo Lingwala. Moderecon prizorgis s-ro Patrice Kuntuala Samba, dua vicprezidanto de Cadeps Klubo.
Post la komenca preĝo dirita de la moderanto, sekvis rondo de prezentoj. Ni notis la ĉeeston de eminenta gasto el Angolo (Luando), la evangeliisto Azzizah Elonga. Post tiuj ĉi sinprezentaj momentoj, la moderanto donis parolpermeson al s-ro Guy Roger Ileka, prezidanto de DKEA kaj membro de Cadeps Klubo por doni la historion de la lingvo Esperanto kaj paroli pri la vivo de Zamenhof, la fondinto de la lingvo Esperanto. Ĉi-lasta zorge sed tamen koncize klarigis la du temojn en la portugala lingvo por nia sola gastino, kiu sentis sin vere trankvila, ĉar la Prezidanto de Cadeps Klubo S-ro Mazangu Diumbeki Paul Alcée kaj la Prezidanto de DKEA S-ro Guy Roger Ileka diris al li klarigojn en la portugala. Poste, la moderanto donis la parolon al S-ro Mazangu Diumbeki Paul Alcée por respondi demandojn de la membroj kaj nia gastino.

Post la ferma preĝo dirita de S-ino Fidélie Kanjinga, Kasistino de DKEA kaj membro de Cadeps Klubo, ni faris familian foton.




Komencinte je la 15:00, la ceremonio finiĝis je la 17:00.

## Zamenhofa-tago, ĉe KOLIBE. "Konga Ligo de Blindaj Esperantistoj "

**Jackson Mafuila**

okazis antaŭ tre mirigita, kvankam ne tre multnombra publiko.
Jes, homoj Ĉiujare, la 15-an de decembro, la tutmonda esperantistaro festas la Zamenhofan Tagon.

Pro oportuneco, Blindaj Esperantistoj festis tiun eventon sabate, la 21-an de decembro 2024 en Kinŝaso. Kvankam anstataŭ la 10 geblinduloj atenditaj, nur 6 sukcesis atingi la lokon sufiĉe frue.

Je 09:03', la ceremonio komenciĝis per la Internacia Himno La Espero.




S-ino Sophie Ngaalula, maljuna blindulino atestis kiel, en 2018 ŝi unuafoje palpis brajlajn dokumentojn kies enhavo estis Esperanto-kurso; kiujn sendis al ni la tiama administra komitato de LIBE, kiu konsistis el Ges-roj Lojaliĉ, Rob Moerbeek, kaj Pierre Luigi DaCosta.

"Cetere, ŝi daŭrigis, ni profitas ĉi tiun okazon por esprimi nian dankon al s-ro Jackson Mafuila, nia Esperanto-instruisto, sed ankaŭ kaj precipe al LIBE, pro tio, ke ĝi ebligis al ni havi brajlajn lernolibrojn en Esperanto.

Estas ankaŭ okazo rememorigi al LIBE, ke ĉi tiuj dokumentoj sole ne plu sufiĉas hodiaŭ, eĉ por s-ro Badin Kabulo, nia instruisto de brajlo, kiu preparas nian junularon kiu ankaŭ siavice devas instrui Esperanton, kun ties specifaj literoj, al la estontaj generacioj de blinduloj. Ŝi do rememorigis ke, ĉi tiuj dokumentoj nun estas sufiĉe damaĝitaj de plurjara uzado.

Ni do kuraĝas peti la afablecon de niaj amikoj ĉe LIBE, por ke ili sendu al ni ne nur novajn librojn, sed se eble, ankaŭ materialojn por skribi brajle kaj, kial ne, adaptitajn komputilojn." Ni ankaŭ kuraĝas esperi ke KELI povos partoprenigi almenaŭ kelkajn el ni al la UK 2025 en Ĉeĥio."

Tiam, 10-jara blindulo kantis en Esperanto.

Nekredemaj je la komenco, la observantoj finfine lasis sin konvinki ke tiuj blinduloj pri vera eltrovaĵo parolas.

La ceremonio surpriziĝis aŭdi, ke tiuj geblinduloj lernis Esperanton per la fingroj, tio estas brajle.

Poste, S-ro Jackson Mafuila alparolis la publikon por klarigi kio fakte estas Esperanto. Li precipe klarigis kiu estis Ludoviko Lazaro, kiun ni festas hodiaŭ, kiu inventis ĉi tiun lingvon.

Ĉiu komprenis ke:

- "Zamenhof naskiĝis en pola urbo (Byalistoko),
- Li travivis ekstremajn stupidajn konfliktojn kies vera fundamenta kaŭzo estis la lingva diskriminacio. Kio inspiris al li la ideon krei lingvon plejeble facile lerneblan, kaj al neniu apartenantan.
- En la jaro 1887 okazis la unua apero de la lingvo.
- Zamenhof persone ĉeestis la unuan UK, okazinta en 1905, en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio)."

Dum sia diskurso, la oratoro de la tago ankaŭ malkaŝis la ekziston de la monda asocio de Esperanto, nomata Universala Esperanto-Asocio UEA, kie estas reprezentataj ĉiuj landaj esperanto-asocioj, diversaj fakaj asocioj ktp. Sen forgesi informi la ĉeestantaron pri la graveco lerni Esperanton ĉar, li komentis, proverbo en Esperanto diras:




Lernu Esperanton hodiaŭ, vi bezonos ĝin morgaŭ. Post la diskurso, li kvazaŭ lude instigis la ĉeestantaron scipovi demandi kaj respondi salutvortojn en esperanto. Ili ankaŭ respondis "Vivu esperanto!", al la krio:

"Vivu esperanto!"

"Vivu Zamenhof"
"Vivu LIBE!"
"Vivu UEA!"
Je la fino de la ceremonio, aperis 4 personoj esprimantaj sian intencon lerni Esperanton. Specifa rendevuo estis fiksita al ili.

Post ĉio ĉi, kokteleto estis disponigita, financite de Sinp Sophie Ngalula.
Partoprenis entute 6 blinduloj kaj 31 spektantoj. Komenciĝinte je 09:10', la ceremonio finiĝis je 10:45'.

# RAPORTO PRI LA RETA KUNSIDO DE LA DKEA KOMITATO

**Remond MATA MATUMONA - Kinŝaso**

La komitata kunsido de DKEA okazis rete la 7- an de decembro 2024 sub la gvidado de la vic-prezidanto Remond Mata, kiu ankaŭ gvidis la debatojn. Kvin personoj partoprenis la debaton. Temas pri sinjoroj:
1-Sro Remond MATA, unua vic-prezidanto.
2- Sro Jackson MAFUILA, ĝenerala sekretario.
3-Sro Amani KAMBALE, konsilanto.
4-Sro Florent NTOTO, observanto.
5-Sro Jean Pierre LUNGIKISA, observanto.

Tri punktoj estis en la tagordo:
1_ Organizo de la Zamenhofa tago 2024.
2_ Ĝenerala situacio de DKEA.
3_ Diversaĵoj.

- *Unua punkto:* Post la aprobo de la tagordo, ĉiuj partoprenantoj akceptis la anoncon faritan de la ĝenerala sekretario pri la organizado de la Zamenhofa tago ene de la kluboj.
- *Dua punkto:* ĉiuj partoprenantoj donis unue sian vidpunkton.

Sro Florent NTOTO, kiu longe kaj klare elmontris la rolon, kiun devas ludi la Landa Asocio. Li ankaŭ klarigis la rilaton inter esperantistoj kaj la Landa asocio: "Ne ĉiu esperantisto estas membro de la Landa asocio, ĉar esperantisto povas fariĝi membro de la Landa Asocio nur per sia membreco al la klubo, fak-grupo aŭ iu ajn organizo aliĝinta al la Landa Asocio. Eĉ DKEJO estas junulara organizaĵo sine de DKEA."
Tiam, la ĝenerala sekretario, Jackson MAFUILA, klarigis kial li publikigis en WhatsApp-grupo, la statuojn de la Landa Asocio : "Estas por ke neniu restu en nescio pri tio, kion diras niaj tekstoj". Li aldonis jenon: "kluboj ne povas ekzisti sen membroj, kaj la Landa Asocio ne povas ekzisti sen kluboj, kaj same kiel Universala Esperanto-Asocio ne povus ekzisti sen la Landaj Asocioj."
Fine, li instigis ĉiujn esperantajn klubojn aŭ grupojn, kiuj jam ne aliĝis aŭ sendis sian raporton al la Landa Asocio, bonvoli fari tion kiel eble plej baldaŭ.
La konsilanto Amani KAMBALE subtenis la deklarojn de sro Florent NTOTO, kaj li siavice aldonis: "DKEA devus prezenti sian laborplanon kaj ankaŭ la proponon de sia buĝeto por la venonta jaro (2025). Ĉar tiuj estas absolute utilaj iloj por pli bona funkciado de la Landa Asocio".
Siaflanke, sro Jean Pierre LUNGIKISA, honora prezidanto kaj respondeca pri rilatoj inter la nacia Komisiono de UNESCO kaj nia

landa asocio: "La ĉefa celo de nia agado devus esti la disvastigo de la internacia lingvo tra la Lando. Cetere, ni devus ĉion fari por enkoduki Esperanton en bazlernejojn kaj mezlernejojn aŭ en niajn universitatojn kaj aliajn amasorganizaĵojn. Tiam, li rememorigis, ke la Landa Asocio funkcias ĉefe dank'al la kontribuoj de kluboj kaj aliaj aliĝintaj organizaĵoj antaŭ ol kalkuli je io alia, kiel ekzemple la subvencio de UEA.

Fine, je la diversaĵoj, la unua vic-prezidanto Remond MATA, gvidanto de la debato, gratulis kaj kuraĝigis ĉiujn, kiuj partoprenis en tiu ĉi kunveno. "Ĉar li asertis, la punktoj kiuj estis traktitaj en ĉi tiu kunveno, estas ĝuste tiuj, kiuj estas la plej grava kaj la plej urĝaj por nia Landa Asocio". Proponinte daton por la venonta kunveno, li finis konsentante pri la dato de la 17-a de decembro 2024, je la 19-a horo, ankoraŭ en zoom. Li tiam deklaris la kunvenon fermita, en unuanima etoso.

Komenciĝinte je la 19:10'; ĝi finiĝis je la20:12'

Farite en Kinŝaso, la10-an de decembro 2024 kaj aprobite de sro Guy ROGER ILEKA, prezidanto de DKEA.

# RETRORIGARDE AL LA KONGA ESPERANTO-MOVADO

**Remond MATA MATUMONA - Kinŝaso**

**1905:** Esperanto-parolantoj konsiderataj kiel pioniroj (Fr. HELA kaj Lucien CHRISTIAENS) en Shangugu ĉe Kivu - lago en DR kongo, tiama liberŝtato Kongo.
**1922 :** unuafoje estis UEA-delegito en DR kongo, Antoon MARREVEE en Banalia.
**1926 :** laŭ la statistikoj de la germana profesoro Johannes Dietterle faritaj por la Internacia Centra Komitato estis nombrintaj kvin esperantistoj en DR kongo.
**1933 :** Trovigxis UEA delegitoj en Panga kaj Constermans ville (hodiaŭa Bukavu).
**1938 :** A. MARREVEE troviĝis en Yangambi kaj Jean MILIARES en Bukavu.
**1948 :** Edward SYMOENS, estas delegito de UEA en Lubumbashi.
**1949 :** Edward SYMOENS, UEA-delegito ekde 1948, okazigis postinstruhorajn Esperanto-lecionojn ĉe Reĝa Anteneo de Elisabethstad (Lubumbashi) kaj dimanĉe, kursojn por plenkreskuloj. Tiuj verŝajne estas la unuaj Esperantaj kursoj donita en DR Kongo.
**1963 :** Konga Esperanto-Instituto (KEI) estas kreita kaj aliĝas al UEA.
**1966 :** Estas starigita" Afrika Esperantista Grupo en Belgujo", Kies membrojn estis kongaj studentoj kiuj sekvis E-Kurson en Bruselo. Prezidanto estis Jacques Hilaire MPOY. En la sama jaro, la grupo aliĝis al Konga Esperanto-Instituto.




**1971 :** Esperanto Instituto de Zairio (EIZ) estas kreita kaj anstataŭas la Kongan Esperanto-Instituton.
**1984 :** Zairia Esperantista Junulara Organizo(ZEJO) estas kreita kiel junulara sekcio de EIZ.
**1989 :** Esperanto Instituto de Zairio (EIZ) fariĝas Zairia Esperanto-Asocio (ZEA).
**1990 :** ZEJO aliĝas al TEJO.
**1997:** Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) anstataŭas la Zairian Esperanto-Asocion (ZEA).
2007: Kongaj esperantistoj iĝas membroj de la Afrika Komisiono.

*Legu pri tiuj informoj en la libro Afero de Espero, verkita de Heidi Goes, paĝo 31.*

# LA SENKURAĜIĜO

**Prime Nsabimana - Rutshuru**



La senkuraĝiĝo estas la malo de la kuraĝo. Ĝi estas malbona kvalito. Kiam ĝi per entrudiĝo alvenas en via koro, ĝi faras detruan laboron. Unue, ĝi solvas viajn internajn energiojn unu post unu. Post tio, ĝi blindigas vin. Pro tio, ĉio ĉirkaŭ vi mallumiĝas. Ankaŭ via horizo mallumiĝas. Ekde tiam vi senkuraĝiĝas. La vojaĝo al la realigo de via revo iom post iom aŭ eĉ subite haltiĝas!!! Tiamaniere, la senkuraĝiĝo mortigis kaj ĝis nuntempe estas mortiganta revojn de miloj da homoj! Ĝi ankoraŭ mortigos aliajn kies revantoj ne ankoraŭ scias la naturon de tiu ĉi senkuraĝiĝo.

**KAŬZOJ DE LA SENKURAĜIĜO**

La kaŭzoj de la senkuraĝiĝo estas multaj. Tie ĉi sube estas la ĉefaj: la malsukceso, la timo, la dubo pri vi mem, la komparo, la malbonaj kunuloj, la negativeco, la manko de celo kaj plano, fine la fizika kaj la psikologia malforteco.

***1. La malsukceso***
Por multaj, la malsukceso estas la unua kaŭzo de la senkuraĝiĝo. Kiam ili malsukcas, ili sendube kredas ke ĉio estas finita. Por ĉiu ajn kiu havas falsan kredon pri la malsukceso, la malsukceso estas la fino, la fino de siaj revoj!!!

***2. La timo***
Ekzistas multaj specoj de timoj: la timoj antaŭeniri, malsukcesi, de opinioj de aliaj, de kritikoj de aliaj, ktp. Ĉiu timo inter ĉi tiuj estas danĝera kaj sufiĉas senkuraĝigi vin kiam ajn vi permesas tion.

***3. La dubo pri vi mem***
Multaj el ni ne sin konas. Ili ne konas kion ili kapablas fari kaj eĉ bonege. Ili havas neniun ideon pri multaj talentoj kiujn ili havas. Pro tio, ili multe dubas pri si mem. Estas manko de memfido interne. Kiam vi ne havas memfidon kaj daŭre dubas pri vi, verdire vi ja senkuraĝiĝas kaj obstakloj stariĝas sur via vojo.

***4. La komparo***
Daŭre kompari vin al iu,speciale iu kiu laŭ vi sukcesis pli ol vi povas negliktiĝi vin. Certe,kiam vi neglektiĝas,antaŭ la malfacilecoj de la vivo,vi facile senkuraĝiĝos.

***5. La malbonaj kunuloj***
La ĉiama vero estas ke kuniĝi daŭre kun malbonaj personoj estas ofte tre grava. Hataj personoj,ĵaluzaj personoj,timemaj personoj, enviemaj personoj kaj aliaj kun similaj malbonaj kvalitoj estas danĝeraj por via disvolvado kaj via bonstato. Tiaj personoj malfortigos kaj senkuraĝigos vin kiam vi troviĝos en kritikaj situacioj.

***6. Via negativeco***
Multaj spertoj montras ke vi ne povas iri for se vi estas negativisto. Se vi gardas negativajn pensojn pri vi mem kaj pri via revo, pli-malpli frue venos la tempo kiam vi falos en puton de senkuraĝiĝo.

***7. Manko de celo kaj plano***
Labori sen celo kaj sen plano signifas labori sen vizio kaj sen destino. Se oni laboras sen

celo kaj sen plano, oni similas al iu kiu iras en foran kaj nekonatan lokon ne havante nek mapon nek kompason. Tiu ĉi ne nur senkuraĝiĝos sed ankaŭ perdiĝos.

***8. La fizika kaj la psikologia malfacileco***
Veredire, se vi ne bone nutras vian korpon kaj vian cerbon vi neniam povas esti sana kaj forta korpe kaj psikologie. Sen la sano kaj la forto, vi facile senkuraĝiĝos kiam vi alfrontos malfacilaĵojn sur la vojo.

**STRATEGIOJ POR VENKI SENKURAĜIĜON**

Ekzistas pluraj strategioj por venki la senkuraĝiĝon.

***1. Scii la malsukceson kiel bonon aŭ ŝancon***
Se vi volas realigi viajn revojn, ĉesu konsideri la malsukceson kiel malbonon, aŭ malŝancon aŭ la finon. Ekde nun vidi ĝin kiel bonon kaj ŝancon, ŝancon por komenci denove, ŝancon por restariĝi kaj reiri antaŭen.

***2. Ĵuru ke vi ne plu permesos timon stariĝi inter vi kaj inter via revo***
De nun decidu ke vi ne plu estos timema. Psikologoj knfirmas ke 90% de niaj timoj estas nur fantomoj.

***3. Decidu ke vi ne plu dubos pri vi***
Ekde nun komencu kredi en vi, en kiu vi estas, en via kapableco.Vi estis mirinde kreita. De nun decidu ke ne plu komparos vin al iu. Se iu persono estas forta en io, vi ankaŭ estas forta en alia afero. Do, vi ne rajtas subestimi vin.

***5. Ne plu kuniĝu kun mabonaj amikoj***
Ĉi tiuj personoj estos la kaŭzo de via senkuraĝiĝo. Evitu ilin kiam ajn tio eblas.

***6. Ĉesu kritiki vin***
Ĉesu agi kvazaŭ vi estus via malamiko. Ekkomencu fanatikigi vin. Kultivu kutimon kuraĝiĝi, komplimentiĝu kaj amikiĝu kun vi. Tio ŝirmos vin kontraŭ senkuraĝiĝo.

***6. Faru nenion sen celo aŭ sen vera plano***
Revu, havu vizion kaj destinon. Tiamaniere vi estos gardita kontraŭ la senkuraĝiĝo.

***8. Adoptu bonajn vivmanierojn***
Manĝu sanajn nutraĵojn: fruktojn, legomojn kaj cerealojn. Ankaŭ trinku sanajn trinkaĵojn. Malgraŭ tio, estas vere ke pura akvo estas la plej bona trinkaĵo el ĉiuj aliaj. Evitadu drinkaĵojn. Havu tempon por gimnastiko kaj paŭzo. Nur sanuloj kaj fortuloj kutime ne perdas kuraĝon facile.



**Ni ridu kune : STULTA FARMISTO**

Iu farmisto kaptis ŝteliston ŝtelante lian tuberon sur la kampo kaj decidis konduki lin al la vilaĝa juĝejo. Duonvoje, la ŝtelisto diris al la farmisto:
"Bonvolu, mi forgesis miajn pantoflojn sur la kampo, ĉu mi ne iru preni ilin?" La kamparano devigis: "Rapidu! mi atendas vin ĉi tie." Li atendis linge kaj rimarkis, ke li estis trompita. Li iris hejmen kaj rakontis al sia pli aĝa frato, kio okazis. Lia pli aĝa frato vangofrapis lin kaj diris: "Vi estas ege stulta! Vi devintus diri al la ŝtelisto atendi dum vi iros preni liajn pantoflojn por li!"
**Elprenita fejbuke, Redakcio.**

*Lingvoj*

**Joel Muhire**



# Leciono pri la Svahila lingvo

## LA INFINITIVO

### 1. ĜENERALAĴOJ

La svahila verbo estas karakterizita per sia aglutina karaktero. Por konjugacii oni devas alligi al ĝi varian nombron da afiksoj: prefiksoj, infiksoj kaj sufiksoj, laŭ la malsamaj kazoj. Ĉiuj ĉi afiksoj havas lokon kaj precizan funkcion.

### 2. LA INFINITIVO

En la svahila, la infinitivo estas markata per la prefikso **KU-** metita antaŭ la vorta radiko.

Ekzemploj: **KU**-FIKA = alveni, **KU**-PATA = akiri, havi, trovi ; **KU**-FANYA = igi, fari **KU**-JUA = koni, **KU**-KAMATA = kapti, **KU**-SIKIA = aŭdi, **KU**-SOMA = legi, lerni, …

**Noto**: la radiko de svahilaj verboj de bantua origino finiĝas per **-A** en la infinitivo. Ekzistas tamen esceptoj, precipe verboj de araba origino, kiuj finiĝas per **-E, -I** kaj **-U**.

### 3. KELKAJ VERBOJ DE ARABA ORIGINO

**Ku-badili** ŝanĝi, **Ku-jaribu** provi, **Ku-baki** resti, **Ku-jibu** respondi, **Ku-faulu** sukcesi, **Ku-keti** sidi, **Ku-fikiri** pensi, **Ku-rudi** reveni, **Ku-furahi** ĝoji, **Ku-safiri** vojaĝi, **Ku-haribu** detrui, **Ku-samehe** pardoni.

### 4. LISTO DE KOMUNE UZATAJ VERBOJ

**Ku-anguka** fali, **Ku-ona** vidi, **Ku-chukua** preni, **Ku-penda** ami, **Ku-faa** utili, taŭgi, **Ku-pika** kuiri, **Ku-fuata** sekvi, **Ku-safisha** purigi, **Ku-funga** fermi, **Ku-sema** diri, paroli; **Ku-fungua** malfermi, **Ku-simama** halti, stari; **Ku-kaa** resti, vivi; **Ku-tafuta** serĉi, **Ku-kata** tranĉi, **Ku-taka** voli, **Ku-ngoja** atendi, **Ku-tupa** ĵeti, **Ku-nunua** aĉeti, **Ku-weza** povi, **Ku-uza** vendi, **Ku -leta** alporti.

### 5. MONOSILABAJ VERBOJ

**Ku-fa** morti, **Ku-wa** esti, **Ku-ja** veni, **Ku-wa na** havi, **Ku-la** manĝi, **Ku-nywa** trinki, **Kw-isha** fini, **Kw-enda** iri.

**NOTO:** La lastaj du verboj, ***Kw-isha*** kaj ***Kw-enda***, kvankam dusilabaj, estis inkluzivitaj en ĉi tiu tabelo ĉar ili kondutas kiel unusilabaj verboj en ilia konjugacio. Ni ankaŭ rimarkas, ke la **U** de **KU-** malfortiĝas al **W** antaŭ la vokalo **E** aŭ I de la radikalo.

## 7. LA NEGATIVA INFINITIVO

La svahila havas negativan infinitivon. Ni formas ĉi tion enmetante la infikson **TO-** inter la infinitiva prefikso **KU-** kaj la radiko de la verbo. La dua **KU-**, deviga okaze de unusilabaj verboj, estas foje aldonita antaŭ la radikalo.

***Formulo : KU + TO (+ KU) + RADIKALO***

Ekzemploj (mifano):

| Jesa formo | | Negativa formo | |
|---|---|---|---|
| **Kusoma** | legi | **Kuto(ku)soma** | ne legi |
| **Kufanya** | fari | **Kuto(ku)fanya** | ne fari |
| **Kujibu** | respondi | **Kuto(ku)jibu** | ne respondi |
| **Kurudi** | returni, reveni | **Kuto(ku)rudi** | ne reveni |
| **Kula** | manĝi | **Kutokula** | ne manĝi |
| **Kufa** | morti | **Kutokufa** | ne morti |

## EKZERCOJ

**Traduku al la svahila:**

a. Lerni ................., kapti ... .........., alveni .............., provi ........................, atendi ................., vidi ..............., aŭdi ...................., pensi ..................., respondi .................., frapi .................., havi ..................., fari .............., scii ..............., ami .............., iri ................., trinki ............., manĝi ..................., esti ................, havi...................., purigi .................., voli .............., sidi ................., reveni ................, sukcesi ...................
b. b Ne kapti ......................, ne fari ................., ne scii ................., ne reveni ............., ne resti ...................., ne alporti ..................., ne atendi ............., ne aĉeti ................., ne vendi ....................., ne legi ..................., ne aŭdi ................, ne ĉesi....................

**Traduku al Esperanto:**

a. Kubaki .................., kusamehe ................, kuanguka ...................., kukaa ..................., kusimama .................., kuuza .............., kununua ..................., kupika ................, kwisha .................., kusema ..................., kufunga ..................., kufungua ..................., kuleta ................, kufa ..................., kufaa .................., kujibu ..................., kujaribu ..............., kufurahi ......................., kuweza .............., kutafuta ...................
b. Kutokuwa ................, kutokunywa ................, kutokula ..............., kutokuja ................, kutofika ..................., kutofaulu ................, kutofurahi ......................, kutofaa .................. , kutokuona ......................., kutokupika ...................., kutotaka .................., kutokuweza ...................., kutofikiri **...........................**




**Konga Espero**

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*

Redaktas ĝin :

Joel Muhire, Kongolanda ILEI-sekciestro.

Kontaktoj:

joelmuhire0@gmail.com

Vacape: +243977643030

Kiel kontribui al ĉi tiu informilo legu en la dua paĝo.

Ni petas subteni la redaktan laboron de Konga Stelo.

**La redakcio**

